

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 37-a JULIO | AŬGUSTO | SEPTEMBRO 2013 N-ro 151

Amu vian Dion per via tuta koro kaj
per via tuta animo kaj per via tuta menso
kaj vian proksimulon kiel vin mem.
JESUO (*Mt.*, 22:37-40).

Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas
rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*
Ĉap. XIX, §7.

Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
ZAMENHOF. *La Espero*.

PATRUJO



Ĉu la disvastiĝo de la spirita lumo, ĉu la homo plilarĝigos sian komprenon pri patrujo, tiel ke li metas sur la saman nivelon ĉiujn naciojn de la mondo?


“La spirita lumo donos al la homoj novan koncepton pri patrujo, tiel ke nuliĝos la detrua movado farita de la hommortigaj kugloj kaj kanonoj.
“Kiam tio okazos, la homo lernos valorigi per laboro kaj amo sian naskolandon, samtempe detruante la materiajn limojn kaj cedante lokon al la nova erao por la homara familio. Tiam la rasoj estos anstataŭitaj de la animoj kaj la patrujo estos honorata ne per morto, sed per vivo bone uzata kaj bone travivata.”

EMMANUEL (Spirito). *La Konsolanto*. Psikografio de Francisco Cândido Xavier. El la portugala lingvo tradukis esperanten Benedicto Silva. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1977. Demando 54.

LORENZANOJ PARTOPRENAS UNIVERSALAN KONGRESON



La 20-a ĝis la 27-a de Julio 2013 okazis la 98-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LA BELA URBO REJKJAVIKO, ISLANDO. Kiel ĉiujare okazas, la teamo de LORENZ partoprenis la Movadan Foiron kaj organizis kunsidon, dum kiu samideano JOÃO SILVA SANTOS prelegis pri la temo “SPIRITISMO – LA TRIA REVELACIO”. Samideano ROY MACCOY, konstanta kunlaboranto de ELDONEJO LORENZ, ĉeestis nian kunsidon kaj ricevis el la manoj de la prezidanto de Lorenz ALMANAKON LORENZ 2013. Ĝis la Argentina Kongreso en 2014!




EL LA EVANGELIO

“Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio.”
JESUO. Mk 10:14.

“La pureco de la koro estas nedisigebla de la simplanimeco kaj de la humileco; ĝi forigas ĉian ideon pri egoismo kaj fiero; tial Jesuo prenas la infanecon kiel emblemon de tiu pureco, kiel li ĝin prenis kiel emblemon de humileco.”

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. 8
– Feliĉaj tiuj, kiuj havas puran koron, § 3.



AMIKOJ DE LORENZ

Ni havas grandan ĝojon prezenti en ĉi tiu numero de KOMUNIKOJ du novajn amikojn de Lorenz. Ili estas Ranjika, el Srilanko kaj Alekso, el Kubo, du junaj esperantistoj kun kiuj ni havas la plezuron korespondi kaj interŝanĝi ideojn pri Spiritismo. Al ili, nian elkoran brakumon! Sur la fotoj: Ranjika (la unua de maldekstre) kaj ŝia familio; Alekso (maldekstre) kaj lia instruisto.

ETERNA AMO...

La luno brilas sola
Neniu stelo ĉirkaŭas,
Neniu nubo kovras,
Tia estas mia vivo...
Ĉar vi foriris.

Vi protektis min.
Same kiel la sunlumo,
Viaj okuloj venigis feliĉon al mi.
Kiam mi sentis min malĝoja,
Vi estis kun mi.

Sed mi perdis vin,
Kvazaŭ mi estis perdinta mian vivon.
Nun, ni disiĝis,
Sed mia amo por vi
Mortos neniam, Paĉjo!

Ranjika

“Mia mortinta onklo ricevis librojn de via Eldonejo Lorenz. Eble vi havas leterojn de li, lia nomo estas Felipe Martinez Perez. Mia onklo ĉiam estos en mia vivo kaj en mia animo, kaj, se en la alia vivo mi vidos lin, ankaŭ mi amos lin. Mi havas trezoron en miaj manoj, *La Evangelio laŭ Spiritismo*, kiu estis granda donaco de amata frato de Lorenz. Mi sendas ĉi tiun leteron al la Eldonejo petante, ke la prezidanto legu ĝin al ĉiuj, kiel elmonro de mia danko.”

Alekso



NI ATENDAS VIAN PARTOPRENON! – La kontribuo de la anoj de Lorenz treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Petu informojn kaj ni vin sciigos pri la laboroj de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo.

AGUARDAMOS SUA PARTICIPAÇÃO! – *A contribuição dos membros ajuda-nos a editar obras espíritas em Esperanto e enviá-las gratuitamente a nossos companheiros no exterior. Entre em contato conosco e lhe informaremos sobre nossos trabalhos e sobre tudo o que você, como membro, receberá no conforto de sua casa.*

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 37-a – n-ro 151 – Julio-Aŭgusto-Septembro 2013

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz

Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal

21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)

Telefonaĵoj: + 55-21-2221-2269 | + 55-21-2450-4768

Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

1890, Pri la adresoj.

Granda nombro de niaj amikoj ĝis hodiaŭ ne sendis ankoraŭ al la aŭtoro ilian nomon kaj adreson. Tial ĝis hodiaŭ en la “Adresaro” mankas ankoraŭ la nomoj de multaj niaj amikoj (aparte ekster Rusujo). Ni ripetas nun per la gazeto nian peton, ke ĉiuj personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto kaj konsentas, ke oni skribu al ili en tiu ĉi lingvo, devas sendi ilian nomon kaj plenan adreson al la aŭtoro de la lingvo Esperanto (Adreso: Dro L. Zamenhof en Cherson, Rusio). Estas tre grave, ke la nomoj de ĉiuj niaj amikoj sin trovu en la “Adresaro”, tre grave por nia afero kaj ankaŭ por la diritaj personoj mem.

L. Z-f.

1890, Al Runstedt, Ĥerson.

Tre estimata Sinjoro!

Kun plezuro mi legis Vian leteron kun la projekto de statutoj kaj kun la proponoj por la lingvo. Vian artikolon pri la proponitaj ŝanĝoj mi sendos al la redakcio de la “Esperantisto” por presi ĝin. Tuŝante la “Ligon” mi devas al Vi diri ke ne volante perdi tempon mi jam sendis al la redakcio mian propran projekton. Mi ĝojas ke Vi energie laboras por nia afero; estus tre bone se Vi sendus kelkajn artikolojn pri nia afero al la gazetoj en Via lando. – En la lernolibro de Henriclundquist sin trovas efektive multaj eraroj; mi esperas ke poste en Svedujo estos eldonita lernolibro pli bona. – J. R. estas efektive J. Runström (li alsendis leteron subskribitan “la svedaj amikoj de la lingvo tutmonda” kaj tial mia respondo estas donita “al J. R. kaj aliaj amikoj”...*

Koran saluton de Via
L. Zamenhof.

* sur la fotokopio ĉi tie mankas unu linio.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof: originalaro 1: unua etapo de Esperanto: 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989. p. 298, 301.

NACIAJ KONGRESOJ EN SUD-AMERIKO: PARTOPRENU LA ARGENTINAN KAJ BRAZILAN KONGRESOJN DE ESPERANTO!



**55^a NACIA KONGRESO
DE
ESPERANTO
KORDOBO - 2013**

ARGENTINA KONGRESO DE ESPERANTO
en Villa Carlos Paz, Córdoba (Kordobo)
Okazos la 12an, 13an kaj 14an de oktobro, 2013

esperanto.org.ar

49-a Brazilia Kongreso de Esperanto

Temo:
ESPERANTO, KIAL NE?
Disvastigado kaj Instruado de la Lingvo.

Tema:
ESPERANTO, POR QUE NÃO?
Divulgação e Ensino da Língua.

Dato: de la 24-a ĝis 28-a
de januaro 2014
Florianópolis/SC
Loko: Hotel Castellar

Inscrições/Alíqoj:
<http://esperanto.org.br/49bke>

Organizanto | Organizadores **Apogo | Apoio**

Esperanto
Associação de Florianópolis
Rua Postal nº 654 - Florianópolis - SC
CEP 88010-970
esperantokluboflorianopolis@gmail.com

Brazilia Esperanto-Ligo
<http://esperanto.org.br>
Brasília-DF

Quando Viajo
AMPLETUR

AIKIDO LINGVO
www.aikidosc.org.br

SANTA CATARINA
Diretoria de Esportes

OMAĜO AL MILORAD, UNU EL LA PLEJ ENERGIAJ KUNLABORANTOJ DE ELDONEJO LORENZ (1930-2012)



La 15-an de Aŭgusto 2012, la ege kara Frato de nia Eldonejo, la serba samideano MILORAD ĜURĜEVIĈ, elkarniĝis. Ni pliatentigas, ke tiu nobla Amiko korespondadis kun ELDONEJO LORENZ dum multaj jaroj. Li perfekte konis Spiritismon kaj havis diversajn spiritismajn librojn; inkluzive, ĉiam post la ricevo de “KOMUNIKOJ”, nia trimonata bulteno, li sciigis al ni, ke li fotokopiis kaj ĝin elsendis al diversaj eŭropaj samideanoj. Kara Frato MILORAD, jaron post via elkarniĝo, akceptu en la spirita mondo niajn sincerajn dankojn. Dio vin benu! La subaj fotoj estis ĝentile senditaj de la serba samideano DIMITRIJE JANICIC, kaj montras samideanon MILORAD ĜURĜEVIĈ. Sur la dua foto, li estas la unua de dekstre, antaŭ Smedereva Muzeo, kun Kongresanoj de SAT, aŭgusto 2006.



NE CEDU

Se la sufer' multvizaĝe grimacas,
la malespero vin kapti minacas,
restu en stato atenda, ne cedu,
certe troviĝos eliro, nur kredu!
Eble penseto savanta subite,
kvazaŭ hazarde kaj neatendite,
en la anim' turmentita ekĝermos,
la malesperon radike ekstermos.
Kredu: nenio ja daŭras eterne,
Sangas kaj floras la koro alterne.

Hilda Dresen

El la verko *Norda Naturo*. Libro originale verkita en Esperanto kaj eldonita de Stafeto en 1967.

HILDA DRESEN (1896-1981), estonino, lernis Esperanton en 1913. Krom esti unu el la plej elstaraj Esperanto-poetinoj, ŝi multe tradukis el la lingvoj estona, rusa, ukraina kaj germana. Hilda Dresen estis honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj oni nomis ŝin “patrino de la estonaj esperantistoj”. (Resumo el informoj trovitaj en *Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj*, verkita de Josip Pleadin)

PRUVOJPRILAEKZISTODEDIO

Kie oni vidas ĉe la primara kaŭzo superegan intelekton, superan ol ĉiuj intelektoj?

“Vi havas proverbon, kiu tekstas: ‘laŭ la frukto oni arbon ekkonas’. Nu! Rigardu la frukton kaj serĉu ties arbon. Nekredemo naskiĝas el malhumileco. Malhumila homo akceptas nenion super si, kaj pro tio li sin nomas forta spirito. Kompatinda estulo, kiun ekblovo de Dio povas neniigi!”

La povo de iu intelekto estas juĝata laŭ ties faroj; ĉar neniu homo povas ja krei tion, kion la Naturo kreas, tial la primara kaŭzo de la kreitaĵaro povas esti nenio alia, ol ia intelekto supera ol la homaro.

Kiaj ajn estas la mirindaĵoj, farataj de la homa intelekto, tiu ĉi havas, siavice, ian kaŭzon; kaj ju pli grandaj la faroj de tiu intelekto, des pli granda devas esti la primara kaŭzo. Ĝuste tiu superega intelekto estas la primara kaŭzo de ĉiuj aĵoj, kia ajn estas la nomo, kiun la homo donas al ĝi.

KARDEC, Allan. *La Libro de la Spiritoj*. El la franca lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. Rio de Janeiro: Brazilia Spiritisma Federacio, 2007. Demando 9.




PANJO

Iam la Ĉiela Patro bezonis meti sur la Teron la unuajn infanetojn,
 li venis al la konkludo, ke li devas voki iun, kiu sciis senĉese pardoni.
 Iun, kiu ne vidus la malbonon.
 Kiu volus helpi sen postulo pri pago.
 Kiu pretus ŝirmi la infanojn en sia koro, kun pacienco kaj karesemo.
 Kiu estus sufiĉe serena por la senĉesa ripetado de la malgrandaj, ĉiutagaj lecionoj.
 Kiu povus maldormi dum multaj noktoj sen plendo.
 Kiu lulkantus mallaŭte por dormigi la bebojn, kiuj ankoraŭ ne scias paroli.
 Kiu restus, pro amo, en la hejmo, prizorgante la infanojn, kiuj ankoraŭ ne povas iri solaj sur la strato.
 Kiu rakontus multajn historiojn pri la vivo kaj la mondo.
 Kiu brakumus kaj kiskus la malsanajn infanojn.
 Kiu lernigus al la infanoj fari siajn unuajn paŝojn, subtenante ilian staradon.
 Kiu ilin kondukus al la lernejo, por ke ili lernu la legadon.
 Oni diras, ke nia Ĉiela Patro longe konsideradis, konsideradis...
 ĝis li vokis la Virinon, donis al ŝi la titolon Panjo kaj al ŝi konfidis la infanojn.
 Jen kial nia Patrino reprezentas la Dian Amon en la mondo, instruante al ni la sciencon pri la pardono kaj la amo, en ĉiuj momentoj de nia surtera migrado. Se ni imitos ŝin, laŭ la ekzemploj de bonkoreco kaj sinofero, kiujn ŝi senĉese donas al ni, ni nepre estos dum la vivo altvaloraj helpantoj de Dio.

MEIMEI (Spirito). *Patro Nia*. Psikografio de FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER.
 Elportugaligita de Affonso Soares. Rio de Janeiro: Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz, 1995.

ĴUS LANĈITAJ!

“KARITATO, NIA STANDARDO” kaj “ENMERGIGANTE EN LA MARON DE AMO” – Jen du novaj libroj de Eldonejo Lorenz en la portugala lingvo pri la vivo kaj la mesaĝo de Frato Fabiano de Cristo. Riĉa komercisto, ankoraŭ juna li fordonis siajn havaĵojn kaj fariĝis frato, sin dediĉante ekskluzive al la plej malriĉaj, montrante belegan ekzemplon pri humileco kaj karitato al ĉiuj. Sur la fotoj, la aŭtoroj Ayrton Xavier kaj Cesar Reis lanĉas la verkojn.



Caridade, A Nossa Bandeira trata-se de mensagem de FABIANO DE CRISTO, por meio do abençoado médium FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER. Ajunte-se ainda o incentivo do infatigável DIVALDO PEREIRA FRANCO, que ofereceu a mensagem de abertura de DR. BEZERRA DE MENEZES. Esperamos que estas páginas inspirem o leitor ao mergulho interior, acompanhando a trilha de luz de FABIANO DE CRISTO.

“Eis porque reconhecemos no presente livro um trabalho sério e atual de reflexões em torno da caridade, ensejando considerações muito oportunas para o cotidiano de todos nós. Estudos despreziosos, resultam de observações e experiências que podem ser aplicadas para a conquista da paz íntima através da vivência espírita-cristã.”

BEZERRA DE MENEZES / Psicografia de DIVALDO PEREIRA FRANCO




Ayrton Xavier (autor)

A vida do inesquecível FABIANO DE CRISTO, pela mediunidade de CESAR REIS, é descrita em detalhes, desde a sua infância em Soengas, Portugal, até tornar-se um comerciante rico no Brasil. Ainda jovem, doou toda sua fortuna para tornar-se o FREI FABIANO DE CRISTO, dedicando toda sua vida exclusivamente aos mais necessitados, deixando um lindo exemplo de humildade e caridade para todos nós.

PALAVRAS DO AUTOR – DE QUE FORMA O LIVRO FOI ESCRITO

“Um dia, após o Evangelho no Lar, tive a impressão que a parede da sala se abria. Ouvi um ruído de água caindo fortemente, patas de animais batendo em pedras. Aos poucos vi um jovem homem, sem camisa, sentado nas pedras, refrescando-se na serra. Percebi que ele estava com saudades de casa. Logo fui transportado com ele para um lugar montanhoso e frio. Agora era um menino que trazia algumas ovelhas e senti o cheiro de pão fresco. Lembrou-se que era quinta feira, dia em que sua mãe fazia pão. Apressou-se, logo chegou à casa, guardou as ovelhas, lavou-se e foi comer o pão quentinho. Assim acompanhei pouco a pouco a trajetória daquele menino. Via as imagens, sentia os cheiros, ouvia os ruídos, e escrevia sofregamente para não perder as cenas que se sucediam sem que eu pudesse controlá-las. Todo o livro se fez assim. Só depois de algumas cenas soube que escrevia sobre FABIANO DE CRISTO”.



Cesar Reis (autor)

LORENZ



n *La Libro de la Spiritoj* (Konkludo, § 7), Allan Kardec nin instruas, ke ekzistas tri gradoj de adeptoj de Spiritismo: tiuj, kiuj nur kredas la manifestiĝojn de la Spiritoj; tiuj, komprenantaj ties moralajn sekvojn; kaj tiuj, kiuj praktikas aŭ penas praktiki tiun moralon.

Kelkaj homoj interesiĝas pri la scienca kaj filozofia karakteroj de Spiritismo, sin dediĉante al ties studo kaj rezonado. Sed multaj aliaj serĉas en ĝi konsolon, ĉar ili suferas la dolorojn de la vivo, kaj la fizikaj, sed ĉefe la moralaj ŝarĝoj de la ekzistado multe pezas al ili. Al ĉi tiuj, Spiritismo sin prezentas kiel la Konsolanto promesita de la Kristo, memorigante al ili la dolĉajn vortojn de Jesuo (Mt 11:28): “Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos.”

Spiritismo konsolas la homojn donante al ili neskeublan fidon al la estonteco kaj pli bonan komprenon pri la surtera vivo. Oni agnoskas la gravecon kaj necesecon de la scienca kaj filozofia aspektoj de la Spiritisma Doktrino. Sed la “laborantaj kaj ŝarĝitaj” alte estimas ĝian trian karakteron, nome la religia, ĉar ĝi fortikigas ilian ligan kun la Kreanto. Tial la ripozigita koro dankas al Dio pro la konsola trajto de Spiritismo.

L. L. Ribeiro

ESPERANTO KAJ SPIRITISMO EN INTERRETO

– Konu la bonegan retpaĝon de *Revista Auta de Souza – Espiritismo em Ação* (Revu Auta de Souza – Aganta Spiritismo), kie vi trovos serion nomatan “Konu Spiritismon”, kun pluraj videoj en Esperanto prezentantaj la bazajn principojn de Spiritismo. Vizitu la jenan retadreson:

<http://www.revistaautadesouza.com/rev/index.php/artigos/categoria/espirtismo-em-esperanto/23/>



HO, MIA KOR’!

Ho, mia kor’, nun batu jam trankvile,
jam proksimiĝas la feliĉa hor’,
en kiu povos spiri mi facile,
ho, mia kor’!

Ne mortis ĉiuj ĝerموj de l’ semado,
aperas jam la fruktoj de l’ labor’;
sufiĉas! trankviliĝu en batado,
ho, mia kor’!

Revenas en la mondon nova sento,
de l’ malliber’ la birdoj flugas for;
ekĝoju pro la grava do evento,
ho, mia kor’!

27/9/1943

L. L. Zamenhof

GRABOWSKI, Antoni et al. (Spiritoj). *Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo*. Originale psikografiita en Esperanto de Francisco Valdomiro Lorenz. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1987.

ESPERANTO DISVASTIĜIS DUM TUTMONDA VOJIRADO



Okazis en Rio-de-Janeiro, de la 23-a ĝis la 28-a de Julio 2013, la 38-a TUTMONDA KATOLIKA JUNULARA VOJIRADO, en kiu ĉeestis PAPO FRANCISKO. ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEIRO, KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ kaj ESPERANTA KUNFRATIĜO DE OKCIDENTA REGIONO profitis la eventon kaj disvastigis Esperanton

inter la partoprenantoj, venantaj el pluraj landoj kaj parolantaj diversajn lingvojn. Sur la foto ni vidas, meze de aliaj, la samideanojn EVANDRO CABOCCLO kaj MÁRCIA BRAGA DE OLIVEIRA.

